

Heinrich Heine,  
Printemps saluto  
*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Iras ĉarma sonoret'  
Tra de mi animon.  
Sonu printemo kantet'  
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,  
Kie floroj pendas!  
Diru al la roz', ke mi  
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919 en 1908.*

Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)

Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuĝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana sano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]). Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier). Li verkis interalie la kant-libreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.

Heinrich Heine,  
Frühlingsbotschaft

Leise zieht durch mein Gemüt  
Liebliches Geläute  
Klinge, kleines Frühlingslied,  
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,  
Wo die Blumen sprießen,  
Wenn du eine Rose schaust,  
Sag, ich laß sie Grüßen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)

*Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto "Gutenberg.Spiegel" sub [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x\\_d=1136&kapitel=10&hash=3da378c6dbfruehlin#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x_d=1136&kapitel=10&hash=3da378c6dbfruehlin#gb_found).*

Heinrich Heine,  
Softe vibras tra l'anim'  
*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l'anim'  
melodi' tenera,  
flugu al la malproksim',  
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',  
kaj se tie ĉarme  
ridos roz', en mia nom'  
sin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaločajo, \*1911 – †1976).*

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

*El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".*